

Leterkesto 4.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-011-A-3

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Kiel ni diris en la tri pasintaj elsendoj malfermante nian leterkeston, alvenis mesaĝoj el 36 landoj de 166 aŭskultantoj. Al tiuj skribintoj ni respondas laŭ la alfabeto de ilia familia nomo.

Marco GIOVANNONI en Lastra a Signa (Italio) estas esperanto-komencanto kaj ekaŭskultanto de radio-programoj. Saluton al li kaj al Will GREEN en London (Britio) kaj al Zsolt GYARMATHY en Gyula (Hungario), kiu sekretarias por la Somera Esperanto-Universitato, kies 26-a renkontiĝo okazos de la 30-a de junio ĝis la 7-a de julio en Gyula.

A.- Interesiĝantoj povas peti la programon skribante al: Somera Esperanto-Universitato, poŝtfako 73, H-5700 GYULA (Hungario). Mi ripetas literumante.

Cl.- Olaf HARNISCH en Dahme (Germanio orienta) ŝatus korespondi pri literaturo, medicino, pedagogio kaj kuirarto. Li havas 26 jarojn kaj estas instruisto de sanitaristinoj. Li estas komencanto en la lingvo esperanto.

A.- Korespondemuloj skribu al Olaf HARNISCH, Am Kloster 1, DDR-7962 DAHME. Mi ripetas literumante.

Cl.- František HAVLIK en Hodonin (Ĉeĥoslovakio) novjarsalutis per tiuj ĉi vortoj:

A.- "...kaj sur tero paco al homoj de bona volo. Multe da elkoraj salutoj el denove libera Ĉeĥoslovakio. Kvankam ĉe ni nuntempe regas bona etoso, ĉio malbona ankoraŭ ne estas venkita. Ni faris nur unuan paŝon kaj en estonteco atendas nin multe da laboro al kiu ni bezonas moralan helpon de ĉiuj bonaj homoj el tuta mondo. Rigardante nuntempan Rumanion ni ne forgesu (ni ĉiuj) kio estas kapabla monopolo de povo sen ebleco de socia kontrolo ĉu dekstra-bruna ĉu maldekstra-ruĝa."

Cl.- Jesus HERNANDEZ en L'Hospitalet apud Barcelona (Hispanio) estas radioamatoro. Li elsendas kaj aŭskultas, kaj Svisa Radio Internacia havas lian preferon kun Radio Polonia. Saluton al Hans HEUSER en Winters'wyk (Nederlando) kaj HIDEOTOŜI Naganaŭa, en Gifu (Japanio), kiu sciigas:

A.- Mi aŭskultas la esperantan programon de via stacio jam de kelkaj monatoj. Via signalo estas forta, kaj mi tre klare aŭskultas la programon.

Cl.- Tiu japana studento antaŭĝojas ricevi vivsignon de ni:

A.- "Ili estos por mi granda valoro kiel la eterna rekordo, ke mi kaptis vian stacion".

Cl.- Hispana Esperanto-Instituto en Barcelono (Hispanio) sendis siajn bondezirojn. Kjell Beder HOFF en Hemnes i Holand (Norvegio) skribis:

A.- "Mi salutas vin okaze de la semajno de internacia amikeco. Mi esperas, ke vi daŭrigos viajn interesajn programojn en esperanto."

Cl.- Nin tutcerte aŭskultas L. HORDIJK en Vlaardingen (Nederlando) kaj Richard HOWARD en Tonghua (Ĉinio) kiu skribis:

A.- "Nun meze de la semajno mi estas tro okupita por serĉi vin sed semajnfine mi ofte klopodis. Kiam mi ne povas kapti vin, vi al mi mankas kaj mi je vi sopiras. De tempo al tempo mi aŭskultas Pekinon sed nun ne tro regule. Por mi ĉi tie en la nordoriento de la lando pli taŭgas la poreŭropa elsendo sed dum nia "vintra" aŭ "nesomera" tempo 20h laŭ Grinviĉo egalas al 04h. Kvankam mi estas ĝisosta verdulo, vekigi tiel frue mi ne tro emas.

Cl.- Hans JANKOWSKI en Dortmund (Germanio okcidenta) eldonis interesan broŝuron pri la medaloj kaj moneroj. La titolo estas "Esperanto - medaloj kaj moneroj. Enkonduke li tiel priskribas sian celon:

A.- "Jam pasis pli ol 102 jaroj post la publikigo de la Internacia Lingvo Esperanto. Dum la lastaj jardekoj aperis multaj Esperanto-poŝtmarkoj kaj memorigaj poŝto-ŝtampoj. Malpli grandan atenton ĝuis la Esperanto-medaloj kaj -moneroj, kvankam ankaŭ ili jam sumiĝis al impona kvanto. En 13 ŝtatoj estas eldonitaj 30 diversaj medaloj kaj 8 moneroj memorigaj al Esperanto. Al ili venos du novaj moneroj, kies eldonon projektas la monfarejo de Kubo okaze de la 75-a UEA-Kongreso 1990 en Havano. Ĉi tiu broŝureto montras medalojn kaj monerojn memorigajn pri Esperanto, kiuj ĝis nun estas konataj al mi. Ĉar antaŭ unu monato mi malkovris medalon ĝis tiam ne al mi konatan, mi estas preskaŭ certa, ke ankoraŭ ekzistas aliaj medaloj ne priskribitaj en ĉi tiu listo.

Cl.- Kaj li petas, ke oni informu lin. Interesatoj pri lia broŝuro kaj laboro sin turnu al

A.- Hans JANKOWSKI, Am Wemphof 5, D-4600 DORTMUND 70. Mi ripetas literumante.

Cl.- Otto KACZINSKI en Havelberg (Germanio okcidenta) skribis

A.- "Kiel fidela, tre interesata aŭskultanto mi subtenas varme la proponon pri plilongigo de viaj esperantaj elsendaĵoj je 25 ĝis 30 minutoj. Ĉefaĵo restu la parolataj vortoj, ankaŭ se vi pro la kulturo kredas devi prezenti iafoje mallongajn esperanto-kantojn, tiam mi petas havigi al ni antaŭe la diritan tekston, ĉar alportata kun muziko tiu ĉi ne ĉiam estas komprenebla."

Cl.- Li interesiĝis pri nia raporto koncerne la revuon "Literatura Foiro" kaj petis la proponitan specimenan ekzempleron. Ni kontentigos lin, kiel ĉiujn aliajn petantojn. La interparolo kun Irena SZANSER vekis ĉe li intereson por ŝiaj libroj pri la esperanto-instruado. En Rumanio nin aŭskultas K. D. KALINKA en Jamlab kaj en Aŭstralio Svetislav KANAĈKI en Melburno, kiu raportas pri la aŭdeblo de niaj elsendoj en lia regiono, kiu estas kontentiga. Kaj li raportas pri la esperanto-elsendoj ĉe Radio-Melbourne. Ĝis nun kun aliaj samideanoj li realigis 19 elsendojn, kelkfoje unu-horajn.

A.- En tiuj elsendoj okazas esperanto-lecionoj ĉiun duan semajnon. S-ro Ralf HARRY, kiu estis ambasadoro de Aŭstralio, raportas pri siaj spertoj en esperanto kaj la resto de la tempo konigas novaĵojn pri la esperanto-vivo kaj intervjuoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj la venontajn semajnojn. Ĝis reaŭdo!